# Festante la Centjaron





La asturaj geesperantistoj renkontiĝis la 29an de aŭgusto 2009 por festi la Centjaron de **Astura Esperanta Asocio**. Gesamideanoj de Gijón kaj Avilés kunvenis tiutage por partopreni en frata vespermanĝo en la bieno de iu membro de **AEA**, en kampara medio ne malproksime de la urbo Gijón. Sed antaŭ la festeno estis iuj formalaj aktoj. La Prezidanto de **Astura E-Asocio**, Carlos E. Carleos, legis salutmesaĝon al la ĉeestantoj substrekante la neceson daŭre laboradi por la progreso de la Esperanta movado en mondo kie la malfacilaĵoj, eĉ se ne estas tiel gravaj kiel en pasintaj epokoj, tamen la cirkonstancoj estas sufiĉe kontraŭaj al nia lingva projekto kaj ties interna ideo.

Poste oni efektivigis la transdonon, al la ĉeestantaj geesperantistoj, de la la ekzempleroj de la lasta unmero de la revuo Heleco. Multe pli ampleksa ol la antaŭaj numeroj de tiu revuo, la 84a numero estis speciale dediĉita al la raportado pri la jarcenta vivo kaj agado de la esperantistoj de nia urbo kaj de aliaj lokoj en Asturio. Kelkaj el la ĉeestantoj estis protagonistoj de parto el tiu historio. Ja, iuj aktivadas ĉe la E-rondo de nia urbo ekde antaŭ 20 jaroj, aliaj, de antaŭ 30 jaroj, kaj estas la kazo de E-aktivisto kia Santiago Mulas, HonorPrezidanto de Astura Esperanta Asocio, kiu travivis, la esperantistan laboron en ekde antaŭ 50 jarojn! Duonon el la jarcento kiun priraportas la menciita numero de Heleco kaj kiun ni estis festante tiutage. Pli ampleksa informo pri tiu akto estas videbla en nia retpaĝo, adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/zt/centjaro/festante.html







